

Charles Ecabert : *Patro Gregoro Girard, 2-a parto*  
Claude Gacond, 228-a radioprelego, 1968.02.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

A.- Vi aŭdas prelegaron de Charles Ecabert pri la svisa edukisto Patro Gregoro Girard.

Cl.- « Juĝante en sia verko *Memorindaĵoj* la lernejan sistemon dum sia junaĝo Patro Gregoro senindulge akuzas la ege domaĝan rutinemon, kiel vidite en nia antaŭa prelegeto. Notinda la metodo por la instruado de la latina, kiu konsistis en nura memorigado de reguloj kaj vortoj sen ia ajn viva kontakto kun la aŭtoroj aŭ la tekstoj. Kiam, decidinte enviciĝi inter la kordeliero, li iris Lucernon kiel novico, li malkovris en la biblioteko klasikulojn, kies nur nomojn li konis : Tito, Livio, Salusto, Tacito.

A.- « *Mi fervorrapide prenis ilin, diras li, sed kioma ne estis mia surprizo, por mi dediĉinta ses ĝis sep jarojn al la latina, kredanta min kapabla paroli kaj skribi kiel senatoro aŭ konsulo, kiama ne estis mia surprizo konstatante, ke mi ne komprenas tiujn Rom-anojn. La vortoj estis al mi preskaŭ ĉiuj kutimaj, sed mi nur post longaj kaj penigaj klopodoj povis deĉifri la frazon. Krome, plurajn frazojn mi devis preterpasi kaj atendi ĝis mi havos pli da fortoj pere de la ekzercado. Tiam mi koleriĝis serioze kontraŭ la kolegia instruado kaj decidis, ke oni renverse estis aginta, komencante de la fino.* »

Cl.- 1782, post la novictempo, Gregoro (tia estas ekde nun lia religia nomo) eklernis filozofion en la ordenaj kolegioj en Offenburg, imperia urbo de Badendukejo, poste en Überlingen, ĉarma urbeto kun dentaj muroj, katedralo, turoj kaj fosaĵoj, kun mirinda vido sur la Bodenan lagon.

A.- Gregoro ne multe ŝatas la sensualismon de Locke tiam validan, kiun li nomas : « *malnobla kaj rampa* ».

Cl.- Pli plaĉas al li la metodo inspirata de Wolf ; ĝi metas :

A.- « *Ordon en la penso, nelamecon en la menso, kaj devigas ĉion klarigi al si.* »

Cl.- Denature sopiris la intelekto kaj koro de Gregoro al la ampleksaj kaj entutaj vidoj ; nebridebla bezono de lia spirito estis, kiel li refoje diras :

A.- « *ligi kaj kompari la ideojn kaj aferojn, opiniojn kaj realaĵojn.* »

Cl.- Por li la potencaj spiritoj karakteriziĝas per tio, ke ili :

A.- « *komparas, juĝas, ligas.* »

Cl.- Parolante pri pliposta tezo-prezentado, dum kiu li devis sin defendi kontraŭ Majenca profesoro, kiu atakis ne nur unu propozicion sed la tutan doktrinon, celante oponigi la principojn reciproke, unu konsekvencon al alia, konsekvencojn al principoj, li konfesas, ke tiu beletra lukto ege konforma al lia gusto, lin profunde impresis :

A.- « *Ĝi plifortigis mian kutimon ĉion kompari kaj ligi kaj, per tio, serĉesplori la veran scienccon, akordigante miajn pensojn unujn kun la aliaj. Tio estas la unika rimedo por trovi la veron, kiu estas unueca.* »

Cl.- Li aldonas :

A.- « *Kiomofte mi renkontis homojn portantajn ideojn plej kontrastajn kaj senharmoniajn. La unuj estas malfortaj mensuloj nekapablaj kunmeti du ideojn tiel, ke estu sentata ilia interakordo aŭ malakordo ; la aliaj tro mallaboremaj por entrepreni tiun laboron aŭ allogitaj per iu ajn utilo.* »

Charles Ecabert : *Patro Gregoro Girard, 2-a parto*  
Claude Gacond, 228-a radioprelego, 1968.02.21 & 24

Cl.- En tiu postulo pri ligiteco de la ideoj kuŝas karakteriza trajto de lia personeco, kaj ĉefa aspekto de lia reforma metodo. Alia pedagogia principo, kiun li proprasparte eltrovis dum siaj studjaroj, estas la neceso konscii pri utilo de la lernobjektoj.

A.- « *Mi lernis matematikon, unue kun iom da malinklino, poste kun gusto kaj eĉ iom da pasio, tuj kiam, en la kurso pri fiziko, mi vidis ties aplikadon. Mi ne ŝatas studon, kies utilon oni ne perceptas.* »

Cl.- Kaj fakte tiu percepto pri utilo estas tre grava afero por la junaj mensoj. Tria funda principo, spertita de Gregoro dum siaj studoj, estis la devo ĉion pliprofundigi, nenion akcepti senpruve, neniam kontentiĝi per vanaj paroloj, kion li, post Paskalo, nomas :

A.- « *Geometria spirito* ».

Cl.- Gregoro Girard tamen diras :

A.- « *La geometria spirito tamen validas nur sur la racia kampo, ekzistas apartenaĵoj, tiuj de la sentoj, de la kredoj, sur kiuj ĝi nur devojigas la penson.* »

Cl.- En 1784 Gregoro estis sendita de la religiaj direktoroj al Wurzburg por pristudi teologion en pli granda kolegio de la ordeno. La tiea kvar-jara restado lin signis por ĉiam.

A.- « *En tiu antikva ĉefurbo de Frankonio, li skribas, mia persono disvolviĝis kaj, tiel dirite, akiris pligrandiĝon.* »

Cl.- Gravan krizon pri religia kredo li spertis en Wurzburg. Ĉar la teologian sojlon li ne blinde transpasis, li faris al si reajn demandojn, tute ne similante al tiuj, kiuj laŭ lia esprimo ne alvenigas la doktrinojn antaŭ la propran konsciencon, por juĝi ilin, por apliki ilin al si, por reguligi sin laŭ ili. Tiuj studentoj havas raran komplezemon al la aliulaj opinioj, ĉar ili ne perceptas la truojn, la senkonsekvencojn, eĉ la absurdaĵojn en la instruo. De tiam ili vivas daŭre en paco kun si mem kaj kun la doktoroj.

A.- « *Tio estas tre agrabla, sed tiu feliĉo ne estis farita por mi. Mi serĉis la veron por mia uzo.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Charles Ecabert. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-